PREFECTURE D'ALGER

1re Année — Jeudi 5 Octobre 1905 — N° 13

5 Centimes — LA — 5 Centimoj

ALĜERIA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL ★★★ DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie.....	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo.....	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo....	2 fr. 50
Etranger.....	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj.....	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER. *Prix sur demande*

DIRECTEUR-FONDATEUR **Barthélemy BALS**
ADMINISTRATEUR **Louis LANDES**

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Jurnalo, 57, rue d'Isly, ALGER. *Prezoj laŭ peto*

ESPERANTO EBLIGAS AMIKECON INTER PLEJ MALPROKSIMITAJ HOMOJ

Sinjorino Rosa Junk, el Bordighera (Italujo), sendas al la ĵurnalo « Esperanto » la sekvantan alvokon, kiun ni ankaŭ enpresas plezure :

ALVOKO

SAMIDEAMOJ !

Terura malfeliĉego trafis la Sudan Itallandon : la tertremo mortigis kaj detruis — kiom — oni ankoraŭ ne scias, ĉar la mortigitaj, la vunditaj kaj suferantoj estas sennombraj, la domaĝo nekalkulebla.

Nia glora Majstro, doktoro Zamenhof diris, en la Kongreso neforgesebla en Boulogne-sur-Mer, ke ni ne kunvenis kiel Francoj aŭ Angloj kun Italoj, k. t. p. sed nur kiel **homoj kun homoj**.

Al Via **homa** koro do, Esperantistoj, mi turnas min hodiaŭ, petante :

Kolektu kaj sendu helpon al **homoj** malfeliĉegaj, en la landon, kien nia kara lingvo ne multe ankoraŭ penetris, ĉar « forte staras muroj de miljaroj ». Vi dissaltigu ilin kaj enkonduku Esperanton kune kun agado de kompatemo !

Antaŭ nelonge itala ĵurnalo skribis : « Oni ne scias de **kia koloro** estas Esperantistoj nek en kian klason ilin meti »

Ni montru do niajn klason kaj koloron :

Hom'amantoj.

Sub la flago verda !

Sendu, gefratoj ; la mizero estas terura ! Kunigu eĉ malgrandetajn donacojn, ĉar multaj malgrandaj iĝos unu granda.

La nomoj de Grupoj aŭ personoj sendontaj estos publikataj en la ĵurnaloj Esperantistaj kaj ĉiunaciaj. Vi presigu kaj disdonu aŭ dissendu tiun ĉi petegon. Mi danke akceptos ĉion por niaj malfeliĉeguloj.

Sinjorino Rosa JUNK.
Bordighera, Italujo, Liguria.

Kiel la ĵurnalo « Esperanto », la « Alĝeria Stelo » kun fervoro malfermos siajn kolonojn por tiu ofero. La nomoj de la donaculoj estos presotaj en niaj venontaj numeroj. La pli malgrandaj oferoj estos akceptotaj.

LA DIREKCIO.

PRI LA FLORO « EDELWEISS »

Nia bona amiko kaj bulgara korespondanto sendas al ni kelkajn liniojn pri tiu rarega floreto nomita france : l' « Etoile du Glacier » ; latine « Gnaphalium Leontopodium » ; greke « Gnaphalion » (neĝero), kaj bulgare « Balkana Stelo ».

Jen estas la skribaĵo de S-ro P. Stojev, el Trojan :

« Dezirante konatigi, ke tiom bela, tiom rarega kaj tiom malofttrovata floreto « nomata « Edel-vaiso » (en Trojan oni ĝin nomas « Balkana Stelo », kiun Ger-

« manoj, Francoj kaj Svisanoj igas ĝin multkosta, ke eĉ ofte Alpaj turistoj riskas « sin mortigi je tieaj krutegaĵoj por fortiri almenaŭ du aŭ tri floretojn de ĝi kaj « plibeligi per ĝi-mem siajn turistajn ĉapojn por sentigi sin fieretaj ; dezirante, « mi diras konatigi, ke Edel-vaiso troviĝas ne sole sur Alpoj, sed ankoraŭ sur niaj « montegaĵoj, nome sur « Koziastena » (Trojan Balkano), mi sendas al vi kelkajn « floretojn de nia « Balkana Stelo » kaj petas publikigon.

« Via : P. STOĴEV. »

Aliparte, ni trovas en « La Science Illustrée » la sekvantajn sciigojn pri Edelweiss :

« Oni ĝin kolektas ĉe la Alpaj anguloj pri kiuj oni ŝatas sin memori ; oni ĝin vidis flori sur ŝatataj deklivoj, kontraŭ la plej granda kaj la plej bela el la naturoj ; oni devas ĝia atingo — certe ne ĉiam — je gravaj penadoj, tio sufiĉas por doni valoron al tiu ĉi memoro. La blua gentiano kaj rododendrono je l' ruĝa floro kaj je l' bonodora verdaĵo estas cent fojoj pli ĉarmaj ; sed siajn ĉarmojn ili konservas nur dum kelkaj horoj. La Leontopodium restadas. Ĝia floro longe parolas pri ĝojo kaj feliĉo, kaj ĝin revidante, ŝajnos al ni ree aŭdi la « Jodel » de la paŝtistoj kaj la sonan bruon en la gajaj Alpaj paŝtejoj.

« Ĝia nomo "Edelweis" (nobla blankaĵo) havas ĉe la germanaj landoj tiel popolan nomon, ke oni ĝin imitis kaj faris Leontopodiumajn florojn el malnovaj militaj kapotoj (precipe en Aŭstrujo). La vendo de tiu komercaĵo estas tiel grava ke la komercistoj, kiuj ĝin vendas, pligrandigas ĉiujare.

« Oni malpravas nomi la "Etoile du Glacier" alpan aŭ svisan floron ; ĝi kontraŭe troviĝas ĉe multaj montoj el la mondo. Ĝi eĉ ne apartenas al la glacaj specoj, kiel ordinare oni kredas, ĉar oni ĝin trovas sur la sekaj kaj varmaj deklivoj de kalkŝtonaj montoj altaj je ĉirkaŭ 1.000 aŭ 2.000 metrojn.

« Oni do eraras, kiam oni kredas ke tiu floro estis nur svisa aŭ Alpa. Vere, estas ke ĝi estas kaj longe restos la simbolon de la altaj florajoj kaj ke ĝia nomo ĉiam pligrandiĝos. Sed, ve ! kiom da centoj, da miloj malfeliĉojn ĝi okazis ! Ĉiujare oni legas en niaj gazetoj rakontojn pri mortaj falegoj okazitaj de serĉado de la "Etoile du glacier". »

Nia korespondanto estas do prava, kiam li diris, ke eĉ ofte Alpaj turistoj riskas sin mortigi por fortiri almenaŭ du aŭ tri floroj da ĝi. Efektive, saman aferon oni povas legi en la francaj gazetoj. Li ankoraŭ estas prava dirante ke tiu floro kreskas ne sole sur Alpaj kaj Svisaj montoj, sed en ĉiu ajn loko kiu havas montojn sufiĉe altajn.

Pri la rareco de Edeweiss, oni rakontis al mi, ke dum la vizitado de la rusaj geimperiestroj ĉe Francujo, oni oferis al la imperiestrino, kiel raregaj floroj, bukedon de Edelweiss.

Tio montras, ne la belecon de tiu floro, sed ĝian rarecon pro la danĝeroj riskataj de tiuj, kiuj volas ĝin atingi, suprenirante la krutegajn montojn kie ĝi troviĝas,

Ni dankas nian bulgaran korespondanton pro lia sendo de floroj Edelweiss. kiu incitis nin skribi artikoleton pri tiu rarega monta floro.

LUDOVIKO LANDES.

Iŋfaŋa Vorto.

Fraŭlino « Bébé » sepjara havis malbonan kutimon marŝigi sian langeton multe pli ol permesis la patrinaj rekomendoj kaj la rolo kutime rezervita al knabinetoj en interparolado.

Ian tagon troviĝante kun sia patrineto ĉe najbaroj, oni rimarkis ke du personoj nur parolis, unue Fraŭlino « Bébé », kiu pri ĉio opiniis prave kaj malprave, kaj la mastro, solena kaj senĉesa parolemulo.

Subite tiu ĉi diris al la filineto : Bebe, ci estas tro babilema, tial neniam ci trovps edzon.

— Ho ! ŝi respondis tuje, skuante sian blondetan kapon, vi bone trovis edzinon.,.

Oni divenas la ridadon de la tuta ĉeestantaro ĉar tio estis tute vera.

Fraŭlino JULIETTE H. (en Lagny).

Leganŧoj ! Varbu al ni KVIN abonantojn kaj vi estos enskribota kiel proktektanta abonanto al la « Alĝeria Stelo ».

Ni ankoraŭ sendos sesan senpagan abonon al kiu ajn persono kies nomo kaj adreso estos senditaj al ni.

DIAB'O KAJ LA BELA DĴAZIA'O

ARABA LEGENDO

Esperante interesi niajn gelegantojn, precipe la eksteralĝeranoj, ni komencas hodiaŭ la publikigon de araba legendo, kiu, laŭ la rakontantoj, okazadis la dek unuan centjaron ĉe la hodiaŭa Alĝera lando.

Ĝi estas unu inter multaj aliaj pri la gento de Uled Hilal'oj, kiu, bone montras la tiamaj arabaj moroj ; amo, kavalira senartifikeco, flanke de trompemaj ruzoj, epopeaj bataladoj, rakontoj pri ĉasado, scenoj de la migranta kaj paŝtista vivado, ĉion oni trovas en tiuj kantadoj, ofte poeziaj kaj vere originalaj.

Ilin oni rakontas plenaere dum la longaj noktkunvenoj ĉirkaŭe de l' bivakaj fajroj ; ili estis tiel multaj kaj diversaj ke ĉiam oni havas novajn.

Cetere, la aŭdantoj neniam laciĝas ; sidante sur siaj kalkanoj, envolvitaj en siaj burnusoj (arabaj manteloj) ili aŭskultas silente kaj religie la voĉon de la rakontanto supreniranta meze de la nokta kvieteco ; tempo al tempo, unu el ili antaŭigas sian nudan brakon por revivigi la fajron kaj tiam la flamo projektas pli belan rebrilon sur ĉiuj tiuj vizaĝojn atentajn kaj ŝajne bronzumitajn.

La vidaĵo de tiuj senmovaj homoj en la mirinda kadro de Sahara'aj noktoj multe impresas kaj oni kredas vivadi dum tiuj heroaj tempoj kiam Diab'o la Hilali'ano trakuris la ebenaĵo, persekutante la rabiston, kiu forportis sur sia ĉevalo la belan Dĵazia'on.

Tiu Dĵazia'o ludas gravan rolon en la Hilalia Epopeo same kiel ŝia amanto Diab'o suprenomita Ŝi donis sian nomon al romana tombo kuŝante proksime de la vilaĝo Khenchela en la Konstantina provinco.

Jen estas la legendo.

Dum la tempo kiam la Hilalia Gento estis stariginta sian tendaron ĉe la Sahara'o, vivadis filino de nobela deveno, kies beleco fama estis glorata de ĉiuj kavaliroj, oni ŝin nomis Dĵazia'o bent Serkane'o.

La gento fieriĝis pri ŝi kaj la plej belaj kantoj nokte kantataj ĉirkaŭ la fajroj estis estintaj verkitaj pri ŝi.

Ian tagon, Dĵazia'o estis kunveninta hejme kvardek nobelajn filinojn por ia festo. Nu, tiun ĉi tagon, junulo de la sama partio, nomita Diab'o ben Ghanem'o, orfo kiu posedis nur kvardek ŝafinojn kaj unu ŝafon, estis paŝtinta sian brutaron en la ĉirkaŭaĵo de la tendo de la junulino. Rimarkante de malproksime virinan kunvenaron, li forlasis sian brutaron kaj alpaŝis por ilin vidi de pli proksime.

Dum li rigardis ilin, li ekvidis, apud la Dĵazia'a tendo, du vazojn en kiuj ŝi kreskigis artiŝokojn kiuj multege lin tentis. Li ekprenis sian tranĉilon, ilin detranĉis kaj ilin manĝis.

Tion ekvidante. Dĵazia'o ekkriis al li : « Za, Hif tiel lin forpelante, malestime, per la krio uzata por la kameloj, kaj al li dezirante unu el la malsanoj de tiuj bestoj.

Diab'o respondis verse :

Tiu malsano estas por kiu ne zorgas sian gaston.
La verdaĵo, emblemo de l' printempo, estas rezervota al gasto.

Incitata de tiuj vortoj, Dĵazia'o tuj diris al siaj amikinoj : « Ni ekiru ĉiuj alpreni po unu ŝafino el tiu junulo. » Tion ili rapide faris kaj alportis al la tendo la kvardek ŝafinojn de Diab'o. Tiu ĉi, tion vidante, ekprenis la ŝafon kaj ĝin alportis mem ; kaj la filinoj mortiginte la ŝafinojn, Diab'o, liaflanke, mortigis la ŝafon dirante, ĉiam verse :

Ŝafaĵo estas la viando de amantoj,
Ĝi estas grasa kaj gustoplena :
La ŝafidoj kaj la kazeiĝita lakto estas la nutraĵo de la Araboj
Potenca anaro sin ĵetis sur mian brutaron ;
La militantinoj estis tiel nombraj, kiel miaj ŝafinoj.
Ili sole lasis la ŝafon alvokantan siajn ŝafinojn,
Kiel patrino per plendaj blekoj ;
Tiu ŝafo estis mia parto el prenaĵo ;
Ĉar la virbesto ĉiam alpartenas al la virhomo.
Ĉiuj la ŝafinoj estis mortigitaj,
Mi mortigis ankaŭ la ŝafon.
Tia estas la marŝado de la mondo,
Jen oni estas riĉa, jen malriĉa :
Mia havo estis forportita de junaj nobelaj filinoj ;
Honoro por mi tio estas kaj bona antaŭsigno.

Tiuj paroloj kaj la granda ŝajno per kiu ili estis diritaj naskis pripenson ĉe Dĵazia'o, kiu konkludis : « Tiu Diab'o havas grandajn sentojn, li estos fama homo. ... »

(Daŭrigota)

A. BAISSAC.

VOJAĜO ĈE OKCIDENTAFRIKAJ BORDOJ

Speciale Esperantigita por « Alĝeria Stelo »

UNUA PARTO

FORIRO EL MARSILIO ✣ ORANO ✣ LAS PALMAS ✣ DAKAR (Senegalo)
ALVENO AL KONAKRY (Franca Ginzo) ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣

La malpli malpura trairejo enhavas budojn, aŭ butikojn, se oni povas tiel nomi la mallarĝajn kaj mallumajn truojn, ĉe kiu la Arabo, Negrulo aŭ Hebreano posedanto de la kajuto staras enfermita, komercaĵoj plej malsimilaj, kiujn oni povas imagi, kuŝas sur tablo antaŭ la enirejo de l' butiko : enlandaj armiloj strange ornamitaj, riĉaj arabaj ŝtofoj, nargileoj kaj fantaziaj aferoj, parfumoj kaj rozodora tabako, daktiloj kaj bananoj, pasteloj de la « Serail » kaj orientaj tapiŝoj je brilaj koloroj, k. t. p. Kompreneble, nur en tiu ĉi strato la fremduloj povas moviĝi, ĉar aliaj stratoj estas trop malpuraj kaj pro tio, neniu volas eniri ilin. Sur la placo troviĝas malgranda enlanda vendejo, ĉe kiu la arabaj kaj hebreaj virinoj proviziĝas.

La Orana klimato estas varma, sed, dank' al la proksimeco de l' maro, tre bone oni toleras la temperaturon.

Ni haltis ĉe Orano kelkajn horojn, poste nia vaporŝipo lasis la havenon veturante al Markolo el Gibraltar, kiu ni trairis la morgaŭa tago, tagmeze. Ĉar tiu ĉi tago estis dimanĉo, la misiistoj festis meson sur senprepara altaro ornamita per ĉiunaciaj standardoj, multe da marvojaĝantoj ĉeestis ĉe la ceremonio, kiu estis sufiĉe bela.

La trairo de l' Markolo prezentas interesan vidaĵon : maldekstre estas Marokaj bordoj, kun la urboj Ceuta kaj Tanĝero ; tre bone oni vidas la ramparojn kaj la havenon de tiu ĉi lasta urbo.

Dekstre kuŝas la ŝtonego el Gilbraltar, kies oni ekvidas la subterajn bateriojn, kiu defendas la trairon de la Markolo ; malantaŭe la ŝtonego, kuŝas la haveno kaj la Angla urbo ; plej malproksime, okcidente, troviĝas la Hispana urbo Terifa.

La vaporŝipo rapide trairas, kaj ni surnaĝas, meze Atlantikoceano, irantaj al Kanariaj insuloj ; post tri tagoj, ni eniris havenon de LAS PALMAS, je la 7-an horon matene ; ĉar ni devis halti la tutan tagon, mi tuj elŝipiĝis por viziti la urbon.

Hispanaj kolonioj, la kanariaj insuloj alportas gravajn profitojn al la patrinpatrujo. Parte, la multaj produktoj, kiujn havigas la lando : fruktoj, legomoj, rikoltoj, k. t. p, ; aliparte, la grandegan komercan negocon de la havenoj Las Palmas kaj Teneriffo. Efektive, ĉe tiuj ĉi du havenoj, ĉiuj ŝipoj, kiuj foriras Amerikon, Sudafrikon kaj Aŭstralion, kaj reciproke, haltas por elpreni provizojn kaj karbon ; pro tio la movo ĉe Las Palmas estas grava.

(Daŭrigota).

GRAFO ALBERT GALLOIS,
Membro de la Grupo de Alĝero kaj de la Nordafriko.

GRAFO GALLOIS, en Riolunato (provinco de Modena) ITALUJO, deziras ricevi malnovajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Li sendos, interŝange, ĉiujn italajn poŝtmarkojn malnovajn kaj nunajn.

L'INSIGNE espérantiste d'Emile GASSE Etoile Verte INTERNATIONAL est en vente dans nos bureaux, 57, rue d'Isly, Alger, au prix de **1** franc ; par poste recommandé, **1** fr. **15.**

Tous les Espérantistes doivent avoir l'**Etoile Verte.**

BONEGA OLIVOLEO EL "PROVENCE"
KAFOJ. - TEOJ. - ORANĜFLORAKVOJ. - PURA SAPO
Firmmarko : **L'Esperanto**
Petu prezarojn, specimenojn. — Speciala rabato al Esperantistoj por ĉiuj senperaj mendoj. — Agentoj akceptataj en ĉiuj landoj. — Skribu : A-te LANISSON, Salon (B.-du-Rhône) Franclando.
Por la Alĝeraj mendoj, turnu vin al S-ro Louis LANDES, 57, rue d'Isly, Alger.

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris